

La koro de la homo

Johannes Goßner

La origina titolo: **Das Herz des Menschen (1812)**

La koro de la homo – ĉu templo de Dio aŭ laborejo de Satano?

Prezentita per dek simbolaj bildoj kaj klarigita de Johannes Goßner (1773-1858)

Esperantigita de Vinko Ošlak

Enhavindiko

1. La bildo pri la interno de homo, kiu servas al peko kaj permesas al diablo regi super si.
2. La bildo pri la interno de pekulo, kiu pentas kaj komencas fuĝi for de peko.
3. La interna situacio de pekulo, kiu kredas en Kriston kaj en la evangelion kaj estas plenigita de la Sankta Spirito.
4. La bildo pri la interna situacio de homo, kiu per la merito de Kristo estas repacigita kun Dio kaj konas plu nenion krom Kriston, la krucumitan.
5. La interno de la savito per Dio – lia koro kiel la templo de la vivanta Dio, la loĝejo de la plejsankta Triunuo.
6. La situacio de la koro de la homo, kies fervoro denove malvarmiĝas kaj kiu denove ekamas la mondon.
7. La koro de la homo, kiu post sia konvertiĝo denove propravole pekas kaj lasas al la peko kaj al Satano regi super si.
8. La morto de la sendia homo kaj la salajro de la peko.
9. La interna situacio de kristano, kiu ĝis la fino persistas en sia batalo kontraŭ la peko kaj en la praktikado de la sanktigata vivo.

10. La morto de la diotima kaj justa homo.

Enkonduko

En la antikva tempo kaj ĝis la novepoko la koro ne estis en la penso de la tiamaj homoj nur organo por prizorgi sangan cirkviton, do pure fiziologia organo, kio ĝi ĉiuokze estas, sed oni kredis, ke la koro de la homo estas la sidejo de liaj pensoj, emocioj kaj de lia konscienco. Biblio, la vorto de Dio, tiun pensmanieron konfirmas. Jesuo mem diris:

„Ĉar el la koro eliras malvirtaj pensoj, mortigoj, adultoj, malĉastaĵoj, ŝteloj, falsatestoj, blasfemoj” (Mateo 15,19).

La homo de la 20-a kaj de la 21-a jarcentoj kredas, ke apud sia fiziologia funkcio la koro estas la sidejo de belaj, romantikaj emocioj, kaj tute profunde de ĉies koro tamen troviĝas bona kerno. Tiu ĉi optimisma percepto estas obĵetata unue de la Biblio, kiel la supraj vortoj de Jesuo pravas, kaj ankaŭ de la vivo mem. Se en ĉiu homa koro funde vere troviĝus bona kerno, de kie venas do tiom da malbono en la mondo, kaj eĉ en tiel perversaj kaj ekstreme suferigaj formoj? La moderna homo kredas, ke pensoj estas produktataj de la cerbo el la elektraj kaj ĥemiaj procesoj, kiuj en la cerba aktivado estas observataj kaj eĉ povas esti instrumente mezurataj. Li ridas super la „superstiĉo” de la antikva kaj mezepoka homo, ĉar tiu kredis, ke ne nur la emocioj, sed ankaŭ la pensoj, do la intelekto, venas el la koro. Tamen tiu gaja moderna homo ignoras, ke lia antikva kaj mezepoka antaŭulo ne kredis, ke la koro pro sia fiziologia funkciado produktas emociojn kaj pensojn, kiel la modernulo opinias, ke tion faras alia fiziologia organo, la cerbo. Li ne rimarkas propran superstiĉon kaj tiel ridindecon, ja kredi, ke la cerbo aŭtoras la pensojn, estas plene egale ol kredi, ke la komputila hardvaro kreas la programaron kaj la informojn. La antikva kaj la mezepoka homoj ne estis tiel naivaj, ili ne kredis, ke la koro kiel la pumpilo de la sango produktas kaj emociojn kaj pensojn, sed li kredis, ke la koro simbolas la homan animon, kiu tion tamen povas produkti, ĉar ĝi estas la nemateria, do la spirita parto de la homa estaĵo. Kaj same kiel la vivo povas deveni nur de alia vivo, tiel ankaŭ la spiritaj enhavoj, informoj, povas deveni nur de la spiritaj fenomenoj, ĉu de Dio, ĉu de anĝeloj, eĉ se falintaj (demonoj), ĉu de homoj.

La Biblio instruas, ke en ĉies koro troviĝas sidejo de la reganto, kiu super la tuta homo, super ties pensoj, emocioj, prijuĝoj, inklinoj, pasioj, sopiroj ktp., sed ankaŭ super liaj decidoj kaj agoj regas, egale, ĉu la homo pri tio konscias aŭ ne. En la homo mem ne troviĝas tia aŭtoritato, ke ĉio menciita povus esti stirata kaj kontrolata per la homo mem. Principe tiaj regantoj povas esti nur du: aŭ tiu, kiu la homon kreis kaj donis al li siajn leĝojn, per estimo de kiuj li povus havi eternan feliĉan komunecon kun sia Kreinto – aŭ la kontraŭanto de la Kreinto, kiu el sia ribelo kontraŭ tiu, kiu ankaŭ lin kreis, kiel la plej supran anĝelon, kaj li volas en sian aliancon de la malbono tiri ankaŭ ĉiun homon kaj lin tiel prirabi pri la eterna feliĉo kun la Kreinto. En la lingvo de la Biblio oni povas resumi: En la homa koro regas aŭ Dio aŭ Satano! Io meza ne troviĝas kaj senrega situacio ne troviĝas. Oni povas portempe havi eĉ ŝtaton sen reganto kaj sen registaro; oni povas

portempe havi entreprenon sen direktoro, sed la homan koron oni sen unu el tiuj du eblaj regantoj ne povas havi!

Ĉu tiel ne estas logika kaj samtempe nepra la demando: Kiu do regas en mia koro? Tiu aŭ tiu povus diri, ke li mem estas la sinjoro en sia vivo. Sed ĉu tio estas vera? Jesuo Kristo diris:

„Vere, vere, mi diras al vi: Ĉiu, kiu faras pekon, estas sklavo de peko.“ (Johano 8,34)

Multaj homoj volas per diversaj metodoj liberiĝi de la aferoj, pri kiuj ilia racio diras, ke ili malutilas al tia homo, sed la koro tamen daŭre postulas konsumadon de tiaj venenaj kaj narkotaj ingrediencoj. Troviĝas propra ekonomia branĉo, kiu bone salajras per pliparte sensukcesaj terapioj kontraŭ fumado, drinkado, drogaĉoj, kontraŭ dependeco de sportaj ludoj, de hazardludoj por gajni monon, de politikaj pasioj, de sia nekontrolebla seksuala dezirego, de televido, komputilo kaj precipe de la plej aĉaj programoj kun motivoj kaj stimuloj de pornografio, perforto, perversaĵoj, krimo kaj okultismo diversspeca. Homo, kiu ne estas suverena konfronte al tiaj aferoj, kiu ne havas plu liberon tuj ĉesi tian konsumadon, estas evidente tia sklavo de la peko, la reganto en lia koro do sendube estas Satano kaj neniel Dio, eĉ se tia homo regule frekventas tian aŭ alian religian manifestacion kaj riton, eĉ se li asertas havi Dion „en sia koro“, sed lia konduto kaj agoj tion neniel konfirmas. Frato Dominiko antaŭ nelonge diris: „Ne sufiĉas havi Dion en sia koro, oni devas Lin havi ankaŭ en siaj gamboj...“ Kaj sekvas alia demando, tre grava: Ĉu oni estas je tia sklaveco por ĉiam kondamnita, sen povo iam ajn kaj iel ajn de ĝi liberiĝi? Ankaŭ en tiu ĉi punkto la vivo, kian oni povas observi, kaj la vorto de Dio, troviĝas en akordo: La homo mem la malbonan reganton de sia koro ne povas faligi, kiel oni foje per puĉo aŭ ribelo aŭ revolucio aŭ milito faligas reganton de tiu aŭ tiu surtera regno. La diablo, kiu regas en la koro de tia homo, estas pli forta ol ĉiuj homaj kapabloj kaj fortoj, por esti faligita kaj tia homo liberigita.

Tamen Jesuo promesis pri tiu ĉi decida temo ion grandecan:

„Se do la Filo vin liberigos, vi estos efektive liberaj“ (Johano 8,36).

Per sia verko „Das Herz des Menschen“ (*La Koro de la Homo*, 1812) kun alegoriaj bildoj kaj klariga teksto la iama bavaria katolika sacerdoto kaj poste protestanta pastoro Johannes Goßner (1773 – 1858) kun tre simpla maniero montras, kia estas la situacio en la koro de la homo, kaj per tio li peras la centrajn kaj tre gravajn spiritajn verojn de la kristana kredo, instruata per la vorto de Dio, per la Biblio.

Tiel la aŭtoro montras, ke sen pento kaj sen konvertiĝo al Jesuo Kristo kaj lia evangelia instruo, la homo ĝuste pro la malbona reganto en sia koro, Satano mem, troviĝas survoje al sia poreterna pereco. Lia demonstrado ankaŭ montras, ke por heredi la ĉielan regnon, kio estas la biblia esprimo por la eterna komuneco kun Dio sur la nova Tero, kiun Dio faros post la plena kolapso kaj detruo de tiu ĉi pekoplana mondo, ne sufiĉas ekkredi en Jesuon kaj sin lasi bapti, kiel li ordonas al siaj disĉiploj, sed ke oni devas

post tio dum sia tuta vivresto postseki Kriston kaj iĝi al li pli kaj pli simila, ĝis oni post sia morto fariĝos plene simila al sia Savanto Kristo, kiel anoncas la apostolo:

„Amataj, nun ni estas infanoj de Dio, kaj ankoraŭ ne elmontriĝis, kio ni estos. Ni scias, ke se li elmontriĝos, ni estos similaj al li; ĉar ni vidos lin, kiel li estas” (1 Johano 3,2).

Se oni post sia konvertiĝo tamen ne iras sanktigatan vojon post Kristo, troviĝas danĝero, ke oni spite tion defalas de la jam atingita kredo kaj tiel perdas la trezoron, antaŭe jam atingitan:

„Ĉar ĉe tiuj, kiuj unufoje estas allumitaj kaj gustumis la ĉielan donon kaj fariĝis partoprenantoj en la Sankta Spirito, kaj gustumis la bonan vorton de Dio kaj la potencojn de la estonta mondo, kaj defalis, ne estas eble renovigi ilin ankoraŭ en pento, dum ili rekrucumas al si la Filon de Dio kaj elmetas lin al publika malhonoro” (Hebreoj 6,4-6).

Bedaŭrinde en multaj kristanaj komunumoj disvastiĝis la kontraŭbiblia instruo, kies slogano tekstas: „Unu fojon savita – por ĉiam savita!” Jesuo vere mem diras, ke ne troviĝas potenco ekster la konvertiĝinta homo, kiu lin povus forpereni de li – sed tiu homo mem tamen povas defali, se li ne iras kun Kristo, se li ne klopodas esti pli kaj pli simila al li, se lia kredo ne estas konfirmata per faroj. Ne, ke la faroj povus la homon savi, sed ili estas la pruvo, ke la homo estas savita pro sia sincera kredo en Jesuon!

Oni nepre ne forgesu, ke ni vivas en la erao de la kreskanta varmeto, kaj la „varmetan” Jesuo elsputos, kiel oni povas legi en la lasta libro de la Biblio:

„Kaj al la anĝelo de la eklezio en Laodikea skribu: Tiele diras la Amen, la atestanto fidela kaj vera, la komenco de la kreo de Dio: Mi scias viajn farojn, ke vi estas nek malvarma, nek varmega; mi volus, ke vi estu aŭ malvarma aŭ varmega. Tial, ĉar vi estas varmeta, kaj nek malvarma nek varmega, mi elsputos vin el mia buŝo. Ĉar vi diras: Mi estas riĉa kaj akiris riĉon, kaj nenion mi bezonas; kaj vi ne scias, ke vi estas la mizera kaj kompatinda kaj malriĉa kaj blinda kaj nuda; mi konsilas al vi aĉeti de mi oron rafinitan per fajro, por ke vi riĉiĝu; kaj blankajn vestojn, por ke vi vin vestu, kaj por ke ne aperu la honto de via nudeco; kaj kolirion, por ŝmiri viajn okulojn, por ke vi vidu. Ĉiujn, kiujn mi amas, mi riproĉas kaj punas; estu do fervora, kaj pentu. Jen mi staras ĉe la pordo kaj frapas; se iu aŭdas mian voĉon kaj malfermas la pordon, mi eniros al li kaj manĝos kun li, kaj li kun mi. Al la venkanto mi donos sidiĝi kun mi sur mia trono, kiel mi ankaŭ venkis kaj sidiĝis kun mia Patro sur Lia trono. Kiu havas oreton, tiu aŭskultu, kion la Spirito diras al la eklezioj” (Apokalipso 3,14-22).

Kiel Jesuo ĉi supre diris, tiel ankaŭ en nia tempo li staras antaŭ la pordo de nia koro kaj frapas sur ĝin. Feliĉa estas tiu, kiu petas Jesuon enveni kaj lian koron purigi de ĉiaspeca peko, ja nur tiamaniere la povoŝanĝo en la homa koro povas okazi. Nur tiel la diablo kiel la „normala” reganto en la homa koro sian povon perdas kaj Jesuo iĝas la reganto en la koro de la pentinta homo.

En tiu ĉi libreto de Johannes Goßner oni legas pri la tn. „mortpekoj”. Tiu falsa distingado venas el la katolika tradicio, kaj la aŭtoro, kvankam jam en sia koro kristano, uzis kelkajn esprimojn el sia pasinto, ja ĉiu peko senescepte devas esti salajrata per morto, kiel la apostolo Paŭlo skribas:

„Ĉar la salajro de peko estas morto; sed la donaco de Dio estas eterna vivo en Kristo Jesuo, nia Sinjoro” (Romanoj 6,23).

Tamen oni devas konsideri seriozan averton de la Skribo, ke ne nur la peko el io farita estas la obstaklo por la homo, havi komunecon kun Dio, sed same la peko el io nefarita, alivorte, pro la manko de la fruktoj de Dia Spirito, kiel Johano diras en sia evangelio:

„Ĉiun nefruktodonan branĉon en mi Li forprenas; kaj ĉiun fruktodonan branĉon li purigas, por ke ĝi donu pli da frukto” (Johano 15,2).

Kaj tio poste okazos per la forprenita branĉo, do per la homo sen fruktoj el la Spirito:

„Se iu ne restas en mi, tiu estas elfjetita, kiel la branĉo, kaj sekiĝas; kaj oni ilin kolektas kaj ĵetas en fajron, kaj ili brulas“ (Johano 15,6).

Ne sufiĉas zorgi, ke oni ne faru tiun kaj tiun pekon; oni devas konsideri la ĉefan ordonon, kiun Jesuo resumas el la Malnova Testamento (5 Moseo 6,5):

„Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso. Ĉi tiu estas la granda kaj la unua ordono. Kaj dua estas simila al ĝi: Amu vian proksimulon kiel vin mem. De ĉi tiuj du ordonoj dependas la tuta leĝo kaj la profetoj” (Mateo 22,37-40).

Sed: Kiamaniere la homo povas ami Dion, ne konante Lin? Kiamaniere la homo povas koni Dion, ne konante Lian Filon Jesuon? Kiamaniere la homo povas koni Jesuon, se li en lin ne kredas? Kaj de kie venas la kredo, kiu nur ebligas koni Jesuon kaj tiu konado ebligas koni Dion kaj nur tio ebligas Lin ami? Jen la respondo de apostolo Paŭlo:

„La fido venas do per aŭdado, kaj aŭdado per la vorto de Kristo” (Romanoj 10,17).

Tio praktike signifas, ke ĉiu, kiu diras, ke li „havas Dion en sia koro”, sed ne legas lian vorton en la Biblio, kaj konsekvence, ne plenumas la ordonojn de Jesuo: penti, konfesi al li siajn pekojn, peti lin por savo, lasi sin bapti, serĉi komunecon kun aliaj kristanoj kaj servi en la eklezio de Kristo per siaj talentoj, ricevataj de supre, paŝi post li kaj alstrebi similecon kun Kristo – tiu mensogas al si mem, al Dio kaj al la mondo. Kiel la homo paŝu post Kristo, se li ne legas la evangelion, por tie ekscii, kiamaniere kaj kien paŝis siatempe Kristo mem? Kiamaniere alstrebi similecon al Jesuo, se oni ne legas ĉiujn vortojn jam en la Malnova Testamento, kiuj pri li atestas, ja li mem diris:

„Vi esploras la skribojn, ĉar vi opinias, ke en ili vi havas eternan vivon; kaj ili estas tio, kio atestas pri mi; kaj vi ne volas veni al mi kaj havi vivon” (Johano 5,39-40).

Unuflanke ŝajnas inter la tempo, kiam tiu ĉi libreto estis verkita, do komence de la 19-a jarcento, kaj nia tempo komence de la 21-a jarcento, do ducent jarojn poste, troviĝi grandega diferenco. En la tempo de la pastoro Johannes Goßner ne nur enkadre de la eklezio, eĉ de la romkatolika, por ne diri luterana protestanta, sed ankaŭ en la publika vivo, troviĝis tre severa morala reĝimo, kies malatento ofte havis dolorigajn konsekvencojn en la eklezio, en la socio ĝenerale kaj antaŭ la ŝtataj instancoj. Multaj aferoj, kiuj en nia tempo estas larĝe akceptataj, kiel malfidelo en la geedzeco, seksualaj spertoj antaŭ la geedziĝo, abortado, suicido ktp. en tiu tempo estis renkontitaj kiel krimaj agoj kun severaj punoj kaj konsekvencoj. Tiel ne estas mire, ke ateistoj tiam preskaŭ ne troviĝis, nur inter aristokratoj kaj tre riĉaj kaj tiel memstaraj burĝoj tio estis ebla, kaj eĉ ilion pliparte kaŝis antaŭ la okuloj de la publiko. Ni farus grandan eraron, se ni priplorus tiujn „bonajn tempojn” de la pasinto. Kiam la ŝtata povo kaj rigoro interplektiĝas kun la eklezio kaj per siaj persekutoj kaj punoj garantias al la eklezio plenajn preĝejojn kaj moralan disciplinon, kiel oni ĝin povas vidi deekstere, tiam naskiĝas samtempe forta hipokriteco. Jesuo mem ĝin antaŭvidis kaj diris:

„Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo. Multaj diros al mi en tiu tago: Sinjoro, Sinjoro, ĉu ni ne profetis en via nomo, kaj en via nomo elpelis demonojn, kaj en via nomo faris multajn potencaĵojn? Kaj tiam mi konfesos al ili: Mi neniam konis vin; foriĝu de mi, vi farantoj de maljusteco!” (Mateo 7,21-23)

Ĉu tio do povus signifi, ke nia tempo tamen estas pli bona ol tiu antaŭ ducent jaroj? Se ni dirus tion, ni kontestus la antaŭdirojn de Jesuo pri la lastaj tempoj. Nia tempo, akompanata per laŭŝtupa falado de ĉiuj moralaj normoj kaj kultivitaj kondukmanieroj, sed eĉ pli malbone, akompanata per amasa mortigado de propra semaro (abortado) kaj per amasa defalado de la kredo certe estas malpli bona ol la tempo antaŭ 200 jaroj – kaj tamen ankaŭ tiu pasinta tempo ne estis bona. En ĝi okazis malpli da eksteraj malmoralaj aferoj, sed en ĝi troviĝis pli da hipokriteco kaj da kaŝa pekado. Sed la plej malbona tempo estas ankoraŭ antaŭ ni, kaj pri tiu parolis Jesuo kaj liaj apostoloj kaj ankaŭ la profetoj de la Malnova Testamento.

Tial nia orientiĝo ne estu idealigo de la pasinto, eĉ se ĝi laŭ la evangelia mezuro estis iomete pli bona ol nia tempo, sed nia orientiĝo estu la vorto de Jesuo, kiu ne ŝanĝiĝas per la tempoj kaj eonoj, sed poreterne restas la sama.

Tiu ĉi eta libro povas esti unu el utilaj stimuloj kaj gvidiloj – ne al tiu aŭ tiu teologia skolo aŭ eklezia denominacio, sed al Kristo kaj lia evangelio. Tiel mi preĝas al nia Savanto Jesuo Kristo, ke li benu la libreton, kiun vi tenas en viaj manoj, kaj ke li ĝin utiligu por moligi la homajn korojn, ke ili eksentu deziron ŝanĝi la malbonan reganton per la bona, kies nomo estas la nura nomo, per kiu ni povas atingi savon, kiel diras la apostolo:

„Kaj en neniuj aliaj estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj” (Agoj 4,12).

Ĉar la plimulto da aktualaj eldonoj en diversaj tradukoj aperas surbaze de la angla prilaboro de tiu ĉi libreto sub la titolo *The Heart of Man*, eldonita ĉe la misia servo „All Nations Gospel Publishers” en Pretorio en Sudafriko, mi devis elekti, ĉu traduki en Esperanton tiun ĉi tralaboritan eldonon, aŭ tamen el la germana originalo. Mi decidis resti ĉe la originalo, eĉ se ĝi povus unuarigarde efiki iomete eksmodiĝinta. Tamen oni devas ĉiam konsideri, ke la spiritaj enhavoj ne subiĝas al la kriterioj modaj kaj tempaj, sed al la kriterioj bibliaj. Tiel la esperantlingva leganto ricevos en siajn manojn la tekston, kian verkis la fervora germana misiisto kaj kristana verkisto Johannes Goßner antaŭ pli ol 200 jaroj. Bonvolu kara leganto ne lasi vin ĝeni de iom tro da anĝeloj en la rakonto, de iom tro barokeca kaj pufa stilo, de tro ofta ripetado de samaj aŭ tre similaj formulaĵoj, precipe en la proponitaj preĝoj, sed faru same kiel la aŭtoro faris: direktu vian rigardon al Jesuo Kristo, la krucumita, ja nur de li la savo venas!

Vinko Ošlak

Klaŭdiforuma / Klagenfurt, en somero 2016

1. La bildo pri la interno de homo, kiu servas al peko kaj permesas al diablo regi super si.

Tia estas la koro de la mondeca homo, kiu sin disponigas al peko kaj „*iradas laŭ la vojo de ĉi tiu mondo, laŭ la estro de la potenco de la aero, de la spirito, kiu nun energias en la filoj de malbeo*” (Efesanoj 2,2). Tiu ĉi mondpercepto esprimas facilanimecon, kiu pri neniu peko atentis, nenion por peko prenas, al si ĉion permesas, kion la malica koro deziras, kaj gaje vivas kontinue sen Dio, sen pensi pri Dio, eterno kaj juĝo.

Ene de la koro loĝas la diablo kun sia aldonaĵo – la sep mortpekoj, prezentitaj per sep bestoj sur la bildo.

La PAVO, kiu kun siaj etenditaj kolorriĉaj plumoj superas la orgojlon de aliaj bestoj; ĝi prezentas la arogantecon, kiu tiom da homoj pro kelkaj avantaĝoj, donitaĵoj, graciaĵoj, pro ilia riĉo aŭ belo aŭ honora pozicio, kion ili sen propra merito ricevis de Dio, kondukas al tio, ke ili komencas plaĉi al si mem, sin levi en iliaj pensoj, kvazaŭ ili estus pro ĉio-ĉi pli bonaj, kaj aprezi aliajn pli malalte, ilin malrespekti kaj ilin subpremi.

La VIRKAPRO, pasia, malbone odoranta besto, estas la bildo de senbrideco kaj de ĉia malpuro.

La PORKO estas la bildo de senmezuro, de manĝegemo, de drinkemo kaj de ĉia nesatiĝeblo.

La BUFO, kiu sin nutras per humo, reprezentante la avidegon, kiu la homojn pelas serĉi la surterajn bonaĵojn kun nesatiĝebla avidego.

La SERPENTO, kiu trompis niajn unuajn gepatrojn kaj ilin misgvidis, ĉar ĝi enviis super ili pro ilia feliĉo, estas la adekvata bildo de la envio kaj de la ĝojo super alies damaĝo.

La TIGRO, unu el la plej teruraj kaj furiozaj bestoj, markas la koleron kaj la venĝemon, kiuj homon kondukas al agoj, karakterizaj por tiaj hororaj bestegoj.

La malrapida TESTUDO reprezentas la letargion kaj varmeton, kiuj forprenas de homo ĉian impeton kaj ĝojon por la bono.

La SANKTA SPIRITO estas elpelita el la koro kaj retiriĝas. Tamen Li ne ĉesas motivigi la pekulon per siaj donacoj kaj gracoj, reprezentataj bilde per fajraj flamoj, ĉirkaŭprenantaj la koron; tamen Li ne trovas enirpovon en la koron, kiu estas plena da peka abomenaĵo kaj tute sub la povo de Satano.

La BONA ANĜELO aŭ la mizerikordo de Kristo klopodas ankaŭ veki la pekulon per la vorto de Dio kaj per aliaj rimedoj, sed homo ne aŭskultas tion kaj ne prenas tion en sian koron, ĉar li estas tute narkotata de la pasioj kaj ĝojaĉoj de la peko.

Tio ĉi estas la terura kaj kompatinda situacio de pekulo, kiu iras laŭ la vojo de tiu ĉi mondo. Ho, kiom multaj homoj vivas en tia mizera situacio tiel komforte, kvazaŭ tio prezentus nenian danĝeron. Ili sin nomas kristanoj, kaj tamen ili estas sklavoj de peko, de la diablo; „*Mi scias viajn farojn, ke vi estas nomata viva, kaj estas malviva*” (Apokalipso 3,1b).

Preĝo

Vi, la plej mizerikorda Dio kaj Savanto, rigardu de via supro per okuloj de via kompatato sur la mizeran situacion de mia povra pekema koro; prilumu la okulojn de mia spirito per radioj de via ĉiela lumo! Faru lumon en mia mallumo, por ke mi mian internon, la karakteron de mia koro, plene rekonu, kaj donu gracon, ke mi povu plene forlasi ĉion, kio sur mi en tiu ĉi situacio pendas. Gardu min, Vi ĉiopova Savanto, ke mi neniam plu disponigu mian koron al la infera malamiko, per mia aprobo de peko kaj ke mi tiel preparas mian koron por ties loĝejo! Alarmigu min per la penso: „Kiu faras pekon, estas sklavo de peko”, tiu apartenas al la diablo, estas infano de la diablo; kaj tiel mi min disponigas al tiomaj pekoj kaj same tiel multaj malpuraj spiritoj plenigas mian koron.

Ho, Vi, la Sinjoro kaj la kreinto de ĉiuj aferoj, kreis mian koron por Vi kaj ĝin dediĉis por esti Via loĝejo, kiel nur povus mi ĝin disponigi al Satano por ties loĝejo! Liberigu min, ĉioreganta Dio, de la povo de Satano, purigu min de ĉia malico de peko, elprenu mian pekeman, malpuran koron; kreu por mi novan, puran koron kaj preparu por Vi en mi loĝejon por glorigi Vian plej sanktan nomon, Jesuo! Amen.

Ho, la ŝafido de Dio, ho Jesuo, mia savanto, la peko estas granda, sed via graco estas pli granda! Mi eme min kaŝos en polvo kaj cindro, nur ne lasu min kuŝi en miaj pekoj. Ho, mortigu tute la volupton peki en mi – la ama rigardo de Vi tiru mian koron kaj penson al Vi! Tenu min, cetere mi ĉiam falos, lasu poreterne neniun pekon plu en mian internon!

2. La bildo pri la interno de pekulo, kiu pentas kaj komencas fuĝi for de peko

La alvenanta graco de Dio kaj Kristo, kiun reprezentas bilde la anĝelo, prezentas al la kulpulo la konsekvencojn kaj la salajron de la peko antaŭ liajn okulojn, nome la glavon aŭ la juĝon kaj la morton. Tiu graco konvinkas lin per la vorto de Dio, ke „... *la maljustuloj ne heredos la regnon de Dio; nek malĉastuloj, nek idolanoj, nek adultuloj, nek mormoruloj, nek viruzaĉantoj, nek ŝtelistoj, nek aviduloj, nek drinkuloj, nek insultantoj, nek rabemuloj, heredos la regnon de Dio*” (1 Korintanoj 6,9-10); ke la juĝo de Dio alportos „... *al tiuj, kiuj estas malpacemaj kaj ne obeas al la vero, sed obeas al maljusteco, koleron kaj indignon, aflikton kaj maltrankvilon, sur ĉiun animon de homo, kiu faras malbonon, de Judo unue kaj de Greko*” (Romanoj 2,8-9).

La pekulo hororiĝas en sia konscienco, profundiĝas en sin mem kaj rigardas en sian koron kaj trovas tie nur pekajn kaj abomenajn. Helpe de pli alta lumo, kiu nun povas fali en lian koron, li rekonas la malbelon kaj hontecon de la peko; li sentas bedaŭron kaj komencas la pekon malami kaj senti antaŭ ĝi abomenon. Li volas esti for kaj libera de tio, sed li sentas la povon de la peko, konas sian feblon kaj emon fari pekon; li ĝemas el sia plej intima korprofundo: „*Danko estu al Dio, per Jesuo Kristo, nia Sinjoro. Per la menso do mi mem servas al la leĝo de Dio, sed per la karno al la leĝo de la peko*” (Romanoj 7,25), respondas al li la Santa Spirito, kiu denove alproksimiĝis al la bedaŭranta deprimata koro kaj per la flamoj de la Dia graco ĝin trapenetas kaj al li peras lumon kaj forton.

Kaj tiel en la momento, kiam la lumo de la Sankta Spirito penetras en la koron kaj la sparkoj de la graco disvastiĝas, devas Satano kun sia horora alpendaĵo retiriĝi. La hontaj monstraĵoj, la abomenaj bestaĉoj kiel la simboloj de la pekaj, forflugas. Kie la lumo enpenetas, tie devas la mallumo malaperi; tuj kiam la tago fariĝas, la nokto devas malaperi. La graco estas tiu lumo, sed la peko estas la mallumo kaj la nokto. Tuj kiam oni komencas malami la pekon, Satano devas eskapi; li regas nur ene de la peko, en la mallumo. Li povas nur pere de la peko enpenetri en la homan koron. La amo al la peko donas al li la ŝlosilon por la koro, por poste ĝin larĝe malfermi por la malbono. Sed la amo al Dio, la malamo al la peko, baras por li la envenon kaj lin forpelas.

Ho, animoj, amu la lumon, malamu la malbonon! Kontraŭstaru la malbonon, kaj Satano fuĝos de vi for. Fermu viajn okulojn por la mondo, por la peko kaj por ĉiuj stimuloj de la malbono; malfermu vian koron por la lumo de la Sankta Spirito! Ĉiu radio de tiu pli alta lumo estu de vi bonvena, ja ĝi forpelas la pekon kaj la mallumon, Satanon kaj la inferon el via koro. Brave rigardu en vian koron, por malkovri ĉiun abomenaĵon de la peko, kiu povus en ĝi resti kaŝita, kaj por abomeni pri ĝi. Sub la lumo de Dio, kiu ĉiam atendas antaŭ via koro por esti enlasata, kaj, tuj kiam vi ĝian pardonon malfermas, tiu lumo envenas kaj ĉion en vi prilumas kaj vivigas, en tiu lumo de Dio vi povos rimarki ĉiun malican beston kaj ombron de la peko kaj ĝin vidi en ĝia tuta malbelo, kaj la graco de Dio, kiu en la malfortuloj estas forta, liberigos vin de tio.

Preĝo

Ho Dio, la fonto de ĉia lumo kaj de ĉia vivo, nur Vi, nur la lumo de Via Spirito povas montri al mi la pekon en ĝia malbela kaj honteco. Lasu brili la lumon de la vivo en mia malhela animo, por ke mi vidu kaj vivu! Vi ne volas morton de la pekulo, Vi ne volas mian morton, sed tiel vere kiel Vi vivas, tiel verece Vi volas, ke la pekulo konvertiĝu kaj ke li vivu. Tiel montru al mi la pekon, kiu min blindigas, mortigas kaj min sklavigas sub Satano. Donacu al mi Vian gracon, kiun Vi per Kristo Jesuo al ĉiuj pekuloj tiel multekoste promesis! Donu, ke ĝi trapenetru mian koron; ĝi vundigu ĝin per sanigaj doloroj kaj per pento, por ke la peko, la morto kaj la diablo de mi retiriĝu kaj faru lokon por Vi! Donu al mi Vian Sanktan Spiriton, por ke Li la amon de Dio, la ĝojon por viaj ordonoj kaj por ĉio bona en mi veku, por ke mi ne lasu plu regi la pekon en miaj membroj, kaj Satano ne povu min plu blindigi, misgvidi kaj supervenki! Lasu min hele kaj klare kaj vive rekoni, ke en la peko troviĝas nenio sano, sed kiu pekas, estas sklavo de la peko kaj infano de la infero kaj de la malhelo. Lasu min neniam forgesi, kion via vorto al mi diras: ke neniu sendiulo antaŭ vi povas stari, ke neniu maljustulo en vian regnon povas eniri; ke la poreterna morto, severa juĝo kaj poreterna pereado ĉiujn atendas, kiuj malbonon faras. Lasu al mi ĉiun pekon serioze bedaŭri, honeste konfesi kaj min el mia tuta koro distancigi de la tuta peko kaj ombro kaj apero de la malbono kaj min deklari por Vi, por ke mi, purigita de ĉia malbono, de ĉia povo de la mallumo, iĝu liberigita, ke mi povu ricevi Vian gracon, Vian lumon kaj Vian komunecon kaj ke mi subigu mian volon plene al Via volo. Amen.

Mi rekonas miajn pekojn, mi subigas min, Dio mia, antaŭ Vi; lasu min trovi gracon en Vi, klinu, Sinjoro, Vian oreilon al mi! Kaj pardonu, kion mi faris; elprenu min pro via mzerikordo! Konduku min de la peka vojo sur la feliĉan vojon de Via graco!

3. La interna situacio de pekulo, kiu kredas en Kriston kaj en la evangelion kaj estas plenigita de la Sankta Spirito

La pekulo, post la alrigardo de siaj pekoj kaj pro la boneco kaj pacienco de Dio, kiu lin tiom longe portis kaj kondukis al pento, deprimata kaj febla, do humiligita, trafita, moligita en sia koro, nun ploras larmojn de sincera bedaŭro. Estas por li doloro en la intimo de lia animo, ke li Dion, tiun grandan amon kaj paciencon, tiel terure, tiel ofte ofendis, malatentis kaj aliflanke al la diablo tiom longe servis.

Se li nun pere de la alveninta mizerikordo estas preta, tiam plenumiĝas, kion la Skribaĵo diras: „*Proksima estas la Eternulo al tiuj, kies koro estas rompita, kaj la spirite suferantaj Li helpas*” (Psalmo 34,18); aŭ: „*Li sanigas la korprematojn kaj bandaĝas iliajn vundojn*” (Psalmo 147,3). La anĝelo – aŭ la graco – paŝas nun antaŭ la koron de la homo, montras al li Jesuon Kriston, la krucumitan, kaj lian evangelion; tio estas, al li estas anoncita la ĝoja, feliĉiga mesaĝo, ke Kristo venis en la mondon, por tiajn pekulojn

kiel li estas, feliĉigi, ke Li por la pekoj mortis kaj tiel akiris pardonon de la pekoj kaj la eternan vivon por li. Tiel al la premita, rompita, klinita kaj malĝoja koro fare de la graco de Dio, estas en Kristo proponita pardono, savo kaj vivo en eterna feliĉo.

Se la pekulo nun tiun ĉi proponon en kredo kaj en humila konfido alprenas, tiel li ricevas Jesuon Kriston, la krucumitan, lian suferon, lian morton, lian meriton; se li kredas vive, ke ĉio-ĉi pro li okazis, al li estis donacita, senpage kaj el graco, tiel li ricevas, kiel ĉiuj kredantoj en Kriston, la Sanktan Spiriton, kaj la Sankta Spirito donas al lia spirito atestaĵon, ke nun liaj pekoj estas pardonitaj kaj ke li estas infano de Dio; ja la Sankta Spirito plenigas lian koron per paco, ĝojo kaj justeco, kaj tiel verece la regno de Dio venis en lian koron.

Cetere ankoraŭ fluas liaj larmoj, sed nun la larmoj de dankemo, de ĝojo kaj sindediĉo al tiu, kiu lin antaŭ la peko savis kaj per sia Spirito plenigis. La korpo kaj la animo ĝojas nun en la vivanta Dio. La stelo brilas en la koro, ĉar la fido fariĝis viva. La malamikoj de la savo, la hororaj bestoj, Satano kaj ties akompanaro nun tute malaperis el la koro kaj nun validas: *„Kaj tiaj estas kelkaj el vi; sed vi laviĝis, sed vi sanktiĝis, sed vi justiĝis en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj en la Spirito de nia Dio”* (1 Korintanoj 6,11).

Ho, kiel mirinda, kiel feliĉa, kiel ĝojiga estas la situacio de la koro de tiel per graco dotita pekulo! Li devus laŭdkanton post laŭdkanto kanti. Li povas neniam sufiĉe ĝoji pri sia Savanto kaj pri Lia graco. Lia amo kaj mizerikordo neniam povas esti sufiĉe admirata, neniam sufiĉe dankata.

Sed li devus ĉe tiu tuta ĝojo en la plej diotima sinteno kaj atento resti kaj ne luliĝi en falsa sekureco, ja la bestoj, la pekoj, cetere troviĝas ekster lia koro – Satano sian rajton kaj povon super li perdis – tamen li ankoraŭ ne estas en tre granda distanco, kaj li kun la peko insidas tage kaj nokte, por denove reveni tien, de kie li estis forpelita. Ju pli li perdis, tiom pli li estas kolerigita. Pro tio atentu kaj preĝu!

Preĝo

Vi, Dia Savanto, kiamanere mi povus pro Via graco kaj amo sufiĉe ĝoji, kiel Vin danki por Via mirinda, savodona evangelio! Vi lasis min trovi en via sango la savon, tio estas la pardonon de ĉiuj miaj pekoj (Efesanoj 1,7). Vi sigelis min kaj mian koron kiel garantiaĵon, Vi donis al mi la Spiriton (2 Korintianoj 1,22). Ho, vivigu ĉiam pli mian kredon! Prilumu ĉiam pli la okulojn de mia animo, por ke mi lernu rekoni la trezoraĵojn, la bonaĵojn, ĉiujn ĉielajn benojn, kiujn Vi akiris per Via sufero kaj Via morto kaj Vi tion proponas al mi en Via evangelio! Ho, kiel Vi min kompatis, animigis, riĉigis! Mi, kiu antaŭe estis loĝejo por Satano, nun estas infano de Dio. Mi, estinte antaŭe restejo de malpuraj spiritoj, nun estas la ĝojo de anĝeloj. Mi, en kiu antaŭe la peko furiozis kaj Satano regis, nun sentas nur plu ĝojon kaj justecon en la Sankta Spirito, kiu en mi loĝas kaj al mi estis donacita de Dio. La malamikoj de la savo estas forpelitaj: la ĉenoj, kiuj min en la sklaveco sub la peko kaj la diablo tenis, estas rompitaj, kaj mi estas libera – al

mi okazis la mizerikordo. Mi trovis la gracon. Kiel mi povus sufiĉe al Vi danki? Laŭdo al Vi estu ĉiam en mia buŝo.

Nur pri unu afero mi petas Vin, mia plej amata Savanto: ne forlasu min kaj ne detenu Vian manon for de mi, Dio, mia savo! (Psalmoj 27,9). Retenu mian koron ĉe unu afero, ke mi havu tiomon antaŭ Via nomo (Psalmoj 86,11). Gardu min, ke mi neniam havu sekurecon, sed ke mi ĉiutempe veke atentu, ke mi neniam plu estu misgvidata de la malamiko kaj trompata per la peko! Firmigu vian gracon en mia koro, por ke ĝi ĉiam malamu la pekon kaj ĉiu okazo por peki forkuru kiel infero! Vi liberigis min, lasu neniam plu min fariĝi sklavo! Vi sanktigis mian internon por Vi, lasu tion neniam plu malsanktiĝi! Mia koro restu la templo de la Sankta Spirito, la domo kaj sidejo de la paco, de ĝojo kaj de justeco en la Sankta Spirito. Amen.

4. La bildo pri la interna situacio de homo, kiu per la merito de Kristo estas repacigita kun Dio kaj konas plu nenion krom Kriston, la krucumitan

En la koro de la kompatita pekulo nun oni povas vidi nenion krom Jesuon, la krucumitan, kaj la postsignojn de Lia sufero; ja la Sankta Spirito, kiu nun lin spronas kaj regas, kaj kies gvidadon li akceptis, povas lian koron plej bone fajrigi en amo, kaj ke Li al li daŭre Jesuon kaj Lian suferan bildon sur la kruco kaj cetere Lian suferon prezentas kaj montras al lia animo, kiom por Jesuo kostis, lian repaciganton, por ke li estu savita. La imago pri la morto de Jesuo kaj la rememoro pri Lia sufero estas tiel lia ĉefa okupiĝo: „*Ĉar mi decidis scii ĉe vi nenion, krom Jesuo Kristo kaj tiu krucumita*“ (1 Korintanoj 2,2); kaj: „*Sed por mi ne estu fanfaronado krom pri la kruco de nia Sinjoro Jesuo Kristo, per kiu la mondo estas krucumita al mi, kaj mi al la mondo*“ (Galatoj 6,14).

Li trovas sub la konduko de la Sankta Spirito en la morto kaj sufero de sia Repaciganto tioman konsolon kaj forton, ke lia tuta koro estas de tio plena, dirante kun Paŭlo: „*Kion do ni diru pri ĉi tio? Se Dio estas por ni, kiu estas kontraŭ ni? Ĉu tiu, kiu ne indulgis Sian propran Filon, sed fordonis lin por ni ĉiuj, ne donos al ni libere ĉion kun li?*“ (Romanoj 8,31-32). La morto, la sufero de Jesuo, estas do por li garantiaĵo de la eterna patra amo de Dio, kiu lin en Kristo repacigis kun Si kaj liajn pekojn ne plu alkalkulas (2 Korintianoj 5,19). Kristo, la krucumita, nun estas la bazo de lia fido al Dio, de la eterna amo; Dio, la Patro, kiu Sian Filon povis doni pro ni en tian suferon, kion Li povus por ni reteni kaj ne doni? Kaj ĉar tiamaniere Kristo, la krucumita, fariĝis lia propraĵo, loĝante en lia koro, al li de Dio donacita, pro tio li trovas en li la plej riĉan fonton ne nur de la tuta konsolo, sed ankaŭ de tuta forto por la bono en si.

La penso, la vivanta kredo en Kriston, lia krucumita amo per si, faras al li la tutan mondĝojon, la tutan karnavidon, la tutan terbrilon, ĉion portempan – por abomenaĵo. Por li estas, kvazaŭ Jesuo al li vokus, la krucumita, konstante: „*Se iu volas veni post mi (do, esti lia disĉiplo), li abnegaciu sin kaj levu sian krucon, kaj sekvu min*“ (Mateo

16,24); ja: „... *kiu ne prenas sian krucon kaj sekvas post mi, tiu ne estas inda je mi*” (Mateo 10,38).

Lia baza inklino tiel estas: fariĝi simila al Kristo, la krucumita. Tiel li ekzercas la sanktecon en Dio, li postiras la sanktigatan vivon, sen kiu neniu povas vidi la Sinjoron (Hebreoj 12,14). Li purigas sin de ĉia makulo de siaj karno kaj de spirito kaj kontinuas sian vojon serĉante la sanktecon kaj la timon antaŭ Dio (1 Korintanoj 7,1). Senĉese li preĝas kaj insistas kun petoj kaj aspiroj en spirito (Efesanoj 6,18). Li ne forgesas fari bonon, ja li scias, ke tiaj faroj al Dio plaĉas (Hebreoj 13,16). Li ĝojas, kiam li estas aprezata per prirido, persekuto, plagoj, humiligoj pro Kristo, ja li scias, ke kiam ni kunsuferas, tiam ni ankaŭ estos kunglorataj.

Koncize dirite, tiu, kiu Jesuon amas kaj sin mem por Li donas, supervenkas en ĉio, ĉar li ankaŭ direktas sian rigardon al la premio de la graco, kiu estas granda kaj estos donita al ĉiuj, kiuj en sia spirita batalo ĝis fine persistas, por tiu validas: „*La venkanto heredos ĉion*” (Apokalipso 21,7). Tiel eĥas en lia orelo, tial ĉe li tekstas: „*Miaj fratoj, mi ne rigardas min kiel jam ektenantan; sed nur jene: forgesante tion, kio estas malantaŭe, kaj strebante al tio, kio estas antaŭe, mi min pelas al la celo por akiri la premion de la supera voko de Dio en Kristo Jesuo*” (Filipianoj 3,13-14).

Preĝo

Ho amo, mia krucumita amo, Jesuo Kristo, Vi repacigis min kun Dio; Vi estu ek de nun la sola vidata en mia koro! Al Vi, al la rememoro je Via sufero kaj morto estu mia koro konsekrate, mia tuta vivo dediĉata! La amo, per kiu Vi min amis, estu kun mi kaj penetru mian tutan animon, kontrolu miaj sentojn, regu super mi en ĉio! Ĝi renovigu min laŭ Via imago, por ke mi iĝu tute simila al Vi kaj ke la fruktoj de Via sufero kaj morto estu en mi perfekte vidataj! Ho, donu al mi la spiriton, ke mi ĉion, kio antaŭe por mi estis gajno, sur kio mi masonis kaj al kio mi fidis, nun rigardu kiel damaĝon, jes, ke mi ĉion-ĉi observu koto kaj balaaĵo, kontraste kun Via senkompara rekono.

Estu Vi por mi *ĉio* kaj ĉio alia estu por mi nenio, por ke mi Vin akiru, en Vi min trovu, por ke mi ne apogu min sur mian justecon, kiu venas el la leĝo, sed ke mi havu Vian justecon, kiu estas donacata per la fido en Vin kaj la sola antaŭ Dio havas validon, por ke mi Vin, la forton de Via resurekto kaj la komunecon en Viaj suferoj rekonu kaj iĝu al Via morto simila (Filipianoj 3,8-10), ĝis mi fine povas diri: „*Kun Kristo mi krucumiĝis, tamen mi vivas; jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi; kaj tiun vivon, kiun mi vivas en karno, mi vivas en fido al la Filo de Dio, kiu min amis kaj sin donis pro mi*” (Galatoj 2,20). Jes, mia unuele amata Savanto, permesu al mi senŝancele rigardi al Vi, la komencanto kaj plenfaranto de mia kredo, kiu, ĉar trovinte en tio plaĉon, elektis la krucon kaj trasuferis hontigon! Via sufero estu la plej dolĉa paŝtaĵo de mia animo, Via kruco mia forto en la batalo kontraŭ la peko, Via morto mia garantio en plago kaj morto; en ĉia atako direktu mian rigardon al Vi! En duboj, timo kaj en deprimaj horoj Via amo

estu por mi la suno kaj la ŝildo, la lumo kaj la sprono, ke mi fariĝu nek laca nek febla, ke mi kun pacienco kuru en batalon, kiu por mi estas destinita! Amen.

Ho, al kiu la Savanto sin dediĉis, donacante pacon en la ties koron, tiu sen ĉeesto Lia vivi plu ne povas, tiu serĉas kaj lin ĉie trovas. Oni havas tiel homamikon, kie bezonata kaj pro li ploranta.

Ho, ke ĉiuj homoj tamen sciu,
kiujn Li per sango deaĉetis,
kia estas ĉi damaĝo,
ke jam en tuja tago
ĉiuj en la brakojn Liajn ne alkuras,
kaj kiel bele ĉiu en proksimo Via,
mia Savdonanto, farti povus!

5. La interno de la savito per Dio – lia koro kiel la templo de la vivanta Dio, la loĝejo de la Plejsankta Triunuo

En la koro de la kompatita kaj per la Sankta Spirito sanktigata pekulo nun aperas la Plejsankta Triunuo, la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito, kiel Kristo diras: „*Se iu min amas, tiu observos mian vorton; kaj mia Patro lin amos; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li*” (Johano 14,23). Tia gloro kaj brilego atingas kristanon, kiu repacigita per la sango de Kristo, lavita de siaj pekoj, nun pro sia dankemo, Kriston, sian Savanton, super ĉio alia amas kaj, ĉar Lin amanta, ankaŭ Liajn ordonojn plenumas. La eterna dieco eniras en lin. Li iĝas amata de la Patro pro ties Filo; li estas de la Patro vizitata. La Patro kaj la Filo kaj la Sankta Spirito loĝas, restas en li; pro tio ankaŭ Paŭlo skribas (1 Korintanoj 3,16-17): „*Ĉu vi ne scias, ke vi estas templo de Dio kaj ke en vi loĝas la Spirito de Dio? Se iu detruas la templon de Dio, tiu detruos Dio; ĉar la templo de Dio estas sankta, kaj vi estas tio.*” Kaj en la dua epistolo al Korintanoj (6,16) li skribas: „*Ĉar ni estas templo de Dio vivanta; kiel diris Dio: Mi loĝos inter ili, kaj Mi iros inter ili; kaj Mi estos ilia Dio, kaj ili estos Mia popolo.*”

Apud la Sankta Triunuo oni povas en la koro vidi la *krucon de Kristo*; kristano, nome, ĝin neniam povas forgesi, neniam perdi el sia koro. La sufero kaj la morto de Jesuo, la krucumita, Lia merito, por ĉiam restas la bazo, sur kiu li masonas, sur kiu lia kredo, lia espero sin apogas, ĝi restas la fonto de lia amo. Tiel li povas rigardi al la Patro aŭ al la Filo aŭ al la Sankta Spirito en si. Sed li povas esti ligata kun Dio eĉ tiom intime, li povas naĝi eĉ en tia anima ĝojo, li tamen ĉiam pensas retrorigarde kaj demandas sin mem: Kiamaniere mi povas kiel pekulo veni al tia nemeritita graco? Jen la respondo: *Per Kristo, la krucumita*, kiu min per sia morto repacigis kun Dio! Li estas, kiu la pekon, la malbenecon kaj la morton per sia kruco de mi forigis kaj la gracon, la savon kaj vivon por mi akiris kaj ĝin al mi donacis. Per Lia graco kaj per Lia merito mi estas, kio mi estas.

Anstataŭ la sep ĉefaj kaj pormortaj pekoj¹, kiuj ĝis nun lian koron okupis kaj por la laborejo de la diablo aranĝis, ni vidas en la koro nun la alian poluson, nome de virtoj, kiel: humileco, amo, donemo, ĉasteco, bonfaro, sinkontrolo, sobreco, pacienco kaj mildeco, fervoremo kaj enpensemo.

Kiu ne estus preta kun ĉiuj fortoj klopodi observi la vortojn kaj ordonojn de Kristo, tio estas: en Lin kredi, Lin ami, Lin postsekvi, iĝi al Li simila, ĉar por la fidelo kaj la amo por tiuj, kiuj Lian vorton tenas (Johano 14,23) estas promesitaj tiel grandaj aferoj, ke Dio mem volas en tian koron enveni kaj en ĝi loĝi. „Ni amas,” vokas Johano, kiu kuŝis sur Lia brusto; „ĉar Li unue nin amis” (1 Johano 4,19); „la amo estas el Dio” (1 Johano 4,7); „Dio estas amo; kaj kiu restas en amo, tiu restas en Dio, kaj Dio restas en li” (1 Johano 4,16). Jam ĉi tie ni povas al Dio tiom proksimiĝi; jam ĉi tie Dio descendas tiel profunde al ni – desupre en nin! Ek klopodu ni tamen serioze en konfidinda maniero ekzerci, kun tiu supereca Gasto en ni, konstante troviĝi en ties proksimo kaj ĉeesto, nin plene al Li disponigi – konstante en Li resti kaj loĝi, ja Dio mem en ni loĝas kaj restas! Ja ĉio ekster ni estas nenio, estas forpaseca – la tuta mondo forpasas kun sia tuta brilo – sed Dio, Kristo en ni, restas poreterne, kaj se ni ĉe Li restas, tiam ni estas *unu* spirito kun Li (1 Korintanoj 6,17). Pere de Li estas al ni donacitaj la multvaloraj kaj la plej grandaj promesoj, nome, ke ni tiamaniere havas partoprenon en la Dia naturo, se ni fuĝas de la forpaseca volupto de la mondo (2 Petro 1,4). Ho, kredu ni do en Lin, tenu ni nin ĉe Li, kvazaŭ ni Lin vidus! Kiu en Lin kredas, jam havas ĉi tie la eternan vivon, la ĉielon en si (Johano 6,47).

Preĝo

Sankta, poreterne ammerita Dio kaj Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo – ankaŭ nia Patro – kiel vi la homojn amas! Kiel vi min, la mizeran, povran pekulon amis, min fajrigis kaj ĝojigis en Via Filo Jesuo Kristo! Vi volas en mi loĝi, Vi restas en mi kaj mi en Vi. Kiel proksime Vi estas al mi parenca, kiel proksime mi al Vi! Mi iĝas plenigata per ĉia dieco (Efesanoj 3,19). Ĉu do mi Vin ne estu amanta, el mia tuta animo, el mia tuta koro, el ĉiuj miaj fortoj amanta? Ho, donacu al mi tiun amon! Igu min iĝi tute amo, kiel Vi tute estas la amo! Permesu al mi ĉiam pli intime senti Vian proksimon, esti ĉiam pli intime kun Vi ligata! Ne permesu, ke mi pro io ajn estu disigita de Via amo! Retenu mian koron esti eterna loĝejo por Vi! Altiru mian spiriton plene al Vi, en Vian internon, por ke mi nur Vin amu, nur de Vi dependu kaj ĉio ekster Vi estu de mi neglektata, ke mi Vin en ĉio vidu. Vin en ĉio trovu, ĉion nur pro Vi faru kaj suferu, por ke Vi estu mia kaj mia ĉio. Vi, Dio de mia koro, Vi, mia partopreno en la eterno. Amen.

Ho, la plej amata Sinjoro, mi tamen scias, ke mi devus iĝi Via templo, tiel proksimiĝu al mia koro, preparu ĝin mem kaj loĝu en ĝi! Nenio min sanktigas, nenio min helpas

¹ Biblio ne konas »ĉefajn« pekojn kaj ne nombras ilin por fari katalogon – kaj pormorta estas ĉiu peko (Romanoj 6,23). La aŭtoro tion ankoraŭ ne purigis el sia katolika vivperiodo. Rimarko de VO.

krome, ne mia propra forto, nenia homa arto; venu en mian koron kaj ŝlosu ĝin, tiel mi trovos en Vi gracon kaj kvieton.

Permesu tiel krom la amo Via
al la aĵ' nenia en animo mia loĝi;
la amo estas, kiun mi elektis
antaŭ la trezoroj kaj la kronoj.
Elpuŝu ĉion, prenu ĉion, kio min
de Vi disigi provas!
Permesu nur al koro mia kaj al mia intelekto
por la amo Via bruli!
Ho Vi, konsolo mia, mia lumo,
mia helo, mia alta bono, vivo,
ho, estu, restu mia partopreno,
al Vi mi volas min dediĉi!
Ja ekster Vi troviĝas nura plago,
nur Vi, nur Vi min povas fari ĝoja!

6. La situacio de la koro de la homo, kies fervoro denove malvarmiĝas kaj kiu denove ekamas la mondon

Sur tiu ĉi bildo vi vidas vizaĝon, kiu per unu okulo aŭdace ĉirkaŭrigardas, sed la alia okulo ŝajnis dormemon. En la koro la signoj de sufero fariĝis pli malgrandaj, la radioj de la graco estingiĝis, la stelo – la kredo – iĝis pli malhela kaj perdis sian lumon kaj poluron. Tio signifas por ni, ke kiam homo en bono iĝas varmeta kaj dormema, lia preĝo kaj vekeco perdas intenson, sed kontraŭe li pli alrigardas la vantaĵojn de la mondo kaj al si permesas ĉiam pli da ĝuo en ĝojo, honoroj kaj amuziĝoj de la mondo aŭ de la karno, se li tiel, kiel nature devas sekvi, ĉiam malpli pensas pri la sufero de nia Savanto, ĉiam malpli ofte alrigardas la Krucumiton, la komencanton kaj la finanton de la fido kaj Lin tiamaniere laŭŝtupe perdas el sia koro kaj tiel la ardaĵo de la enprofundiĝo estingiĝas, la amo al Jesuo malvarmiĝas, la graco retiriĝas, la fido ŝanceliĝas kaj mortas. Fariĝas malhele, malvarme en lia koro; li fariĝas letargia kaj senesperiga. Kaj kio okazas nun?

La mondo, kiun reprezentas la viro kun ponardo, nun denove perforte enpenetras en la koron. Ĉar la viro neniun forton de la fido, neniun kuraĝon, neniun lumon, neniun amon plu havas, li timas antaŭ la minacoj de la mondo, aŭ li estas trompata per flatado kaj persvadado kaj denove ekamas la mondon.

En tia situacio denove venas Satano, kiu transportas denove la malnovajn bestojn en la koron, kaj en tio li havas tiom pli facilan sukceson, ĉar li neniun gardon, neniun kontraŭstaron plu trovas, ĉar la homo iĝis varmeta, letargia en preĝo kaj ne evitas plu okazojn de peko, sed li sin mem disponigas al tiu danĝero.

La anĝelo kaj la graco de Kristo provas Satanon forpeli; sed ĉar la homo mem per sia peko malfermas la grandan pordon kaj ne gardas kaj ne preĝas, ne kunlaboras kun la graco, la peko enpenetras kaj per la peko Satano denove envenas en lian koron.

Ĉi tie do venas en validon, kion Kristo diris: „*Viglu kaj preĝu, por ke vi ne eniru en tenton!*” (Mateo 26,41) kaj Paŭlo: „*Preĝu senĉese!*” (1 Tesalonikanoj 5,17). La preĝo estas la animo de la kristana vivo; kie la preĝo febliĝas, febliĝas ankaŭ la bono – la preĝo estas la spirita spirado. Kie ĝi ekmankas aŭ iĝas pli malforta, tie mortas ĉio bona. Tiel ankaŭ, se ni ne gardas kaj iĝas dormemaj, tiel venas la malamiko kaj semas la semaĉon sub la tritikon.

La negardata kaj senarmita koro disponiĝas al ambaŭ malamikoj, nome, al la peko kaj al Satano. Tiel ne permesu la sanktan gardadon – la preĝon, kaj la internan meditadon, rigardon al Jesuo la krucumita – neniam forlasi vian animon, neniam endormiĝi, por ke nenio malpura en la templon de Dio povus enpenetri kaj ĝin korupti, ja cetere ankaŭ Dio vin frapos. „*Estu sobraj, vigladu; via kontraŭulo, la diablo, kiel leono blekeganta ĉirkaŭiras, serĉante, kiun li povos forgluti; lin rezistu, konstantaj en la fido*” (1 Petro 5,8-9). „*Tiu do, kiu opinias, ke li staras, sin gardu, por ke li ne falu*” (1 Korintanoj 10,12). Neniam ni demetu la armilaron, kiun Paŭlo tiel bele priskribas en Efesanoj 6,13-19: „*Ĉar nia luktado estas ne kontraŭ sango kaj karno, sed kontraŭ regantoj, kontraŭ aŭtoritatoj, kontraŭ mondpotenculoj de la nuna mallumo, kontraŭ la spiritoj de la malbono en la ĉielejoj.*” Nur per la ŝildo de la fido ni povas kontraŭŝirmi la fajrajn sagojn de la malbona spirito. Tial la fido devas por ĉiam resti fortika kaj viva, la amo por ĉiam daŭra; kaj tio povas sukcesi nur tiam, se ni neniam perdas Jesuon kaj Lian suferon el niaj okuloj kaj el nia koro, se ni nian rigardon deturnas de la mondo kaj ĝiaj allogadoj kaj senĝene alrigardas Lin; kiam ni nian koron riglas kontraŭ ĉiuj allogoj de la peko, kaj se ni konservas nian rilaton al Dio kaj nin ĉiam koncentras al la momentoj de la graco Dia kaj al la impulsoj de la Sankta Spirito kaj nin al tio disponigas. La fido perdas sian tutan forton, sian lumon kaj vivon; la amo frostiĝas, se la fundamento, sur kiu ili staras, Jesuo, la krucumita, el nia koro perdiĝas.

Preĝo

Sinjoro, Vi min esploras kaj min konas. Vi, la konanto de koroj! Vi konas mian malforton, la malpersiston de mia koro, ke ĝi facile denove malvarmiĝas en sia amo kaj febliĝas en sia preĝo. Vi scias, kiel forte mi estas inklina por la peko kaj por la mondo, kiel mi ĉiujn klopodojn kaj tutan penon, seriozon kaj memregadon kaj atentemon super mia koro evitas kaj timas. Fortigu min, vivigu min; retenu min en firma staro! Sen Vi mi povas fari nenion! Ne forlasu min, ne detenu vian manon for de mi, Dio, mia savo! Mi ne povas en Vi resti, se Vi min ne tenas kaj en mi restas. Ne permesu estingiĝi la lumon en mi, la amon ne frostiĝi, la konfidon ne ŝanceliĝi, la fidon ne morti! Donu al mi ĉiam novan forton kaj ĝojon por preĝi; donacu al mi ĝojon ĉiam alrigardi Vin. Donu al miaj okuloj vekecon, ke mi senŝancele restu dependa de Vi kaj ke mi ĉiam min fortigu per Via sufero. Deturnu miajn okulojn de vantaĵoj, por ke mi ilin ne vidu! Amen.

Ho, kio ni sen Jesuo estas? En bezono, mizero kaj povreco. Ho, kio do ni estas? Plenaj de mizero. Ho, Sinjoro Jesuo, mi volas ĉirkaŭbraki vin! Donu al ni la forton de Via Spirito, por ke ni per la sama forto mortigu ĉiujn farojn de la karno kaj supervenku la pasiojn.

Gravuru Viajn sangajn vundojn, ho Jesuo, en la koron mian! Faru, ke dum ĉiuj horoj por eterno ili en mi sen forgeso restu!

Se io falsa en min falas, tuj rigardas mi suferon Vian, por permesi al la koro mia ne pritrakti pekon sen okulo serioza.

Ho, retenu tia mian vidon, ĝis Vi rehejmigos min al Vi! Retenu vian mortdoloron viva en la koro mia!

7. La koro de la homo, kiu post sia konvertiĝo denove propravole pekas kaj lasas al la peko kaj al Satano regi super si

Tiu ĉi bildo reprezentas la internan situacion de la pekulo, kian Kristo en la evangelio (Luko 11,24-26) priskribas tiel: „*Kiam la malpura spirito eliris el homo, ĝi trairas tra senakvaj lokoj, serĉante ripozon; kaj ne trovante ĝin, diras: Mi reiros al mia domo, el kie mi eliris. Kaj alveninte, ĝi trovas ĝin balaita kaj ornamita. Tiam ĝi iras kaj alprenas al si sep aliajn spiritojn pli malbonajn ol ĝi mem, kaj ili, enirinte, loĝas tie; kaj la fina stato de tiu homo fariĝas pli malbona, ol la unua.*”

Kia katastrofa alrigardo! Satano tronas kaj loĝas, regas kaj komandas en la koro, kiu tuj antaŭe estis la loĝejo de Dio, la templo de la Sankta Spirito. La malnovaj pekoj kaj pekaj abomenaĵoj tie denove estas videblaj; la abomenaj bestoj denove ennestiĝis kaj sidas tie kvazaŭ en propra posedo. Kaj de kie tio venas? Tiu homo ne observis la gracon, kiun li havis; li forgesis la purigadon de siaj antaŭaj pekoj kaj ne praktikis la sanktecon en Dio kaj sian sanktigadon. Kaj tiu, kiu ne marŝas antaŭen, devas retromarŝi. Stari surloke oni ne povas. Tiu, kiu ne luktas serioze, por trairi la mallarĝan pordon, kiu ne progresas konstante kaj kuraĝe sur la mallarĝa vojo, kiu ne provas sin fortigi per malamo kontraŭ la peko kaj per la priridado de la mondo kaj ĝia delico, kiu ne evitas surpaŝi ĉiun pekan vojon, tiun altiras la truko de la diablo, la allogo de la peko kaj la volupto de la mondo denove en sian reton. Kaj okazas, kiel Petro diras (2 Petro 2,22): „*Hundo reveninta al sia vomitaĵo, kaj porkino lavita al ruliĝado en koto.*” Tio signifas: la malatenta homo denove falas en siajn malnovajn pekojn kaj disponigas sin al voluptoj kaj inklinoj denove.

La *Sankta Spirito* retiriĝas; ja kiamaniere la Dia Sankta Spirito povus loĝi apud la malpura spirito? Kiamaniere la sama koro povus esti samtempe la templo de Dio kaj la loĝejo de la diablo?

La *anĝelo*, la graco, adiaŭas en tristo, tamen kun levitaj manoj, montrante, ke Kristo ankoraŭ havas mizerikordon super la mizera pekulo, samtempe petante, vokante al li: Ho, ke vi finfine rekonu, kio servas al via paco! La patra brako de Dio, la koro de Lia kompatato ankoraŭ estas por vi malfermitaj! Revenu denove, vi defalinto! Ankoraŭfoje Mi vin kompatos! Sed la homo tion ne aŭdas plu. Li aŭdace rigardas en la mondon, li observas nenion plu, nek la kaŝitajn nek la publike videblajn pekojn kaj ilian hontecon. Li ne vidas la abismon, en kiun li sin ĵetas; li ne konas la hororon, kiu en lia koro troviĝas, ĉar lia fido estas morta, la *stelo* perdis plene sian lumon kaj li estas plene blindigita fare de Satano.

Vidu, kara kunpilgrimanto, tiel staras via afero, se vi viajn pekojn konfesis, bedaŭris kaj petis pardonon, sed vi ne protektis vin per la graco de Dio antaŭ la peko, sed denove vin ĵetis en ties brakojn. Post tio la afero estas pli malbona ol ĝi iam estis, ja la peko kaj la diablo sidas nun pli firme en vi kaj furiozas ankoraŭ pli energie, kaj vi estas nun ilia plena sklavo kaj servutulo. Tial gardu vin antaŭ la refalo en malnovajn pekojn kaj kutimojn! Se vi unu fojon akiris gracon, vin distancis de la peko kaj de la diablo, de la orgojlo, de la avaremo, de la malĉasteco, de la envio, de la senmezuremo, de la kolero, de la letargio kaj anoncis al ili militon, tiel restu la senŝancela malamiko de ili kaj neniam plu permesu ilin enveni en vian koron. Forpelu ilin, fuĝu de ili, kie ajn vi povas, ja ili vin en ĉiu tempo provos denove okupi kaj alpreni sian malnovan loĝejon, demonstri sian malnovan posedrajton, kaj tuj, kiam vi proponos al ili lokon, en vi okazos pli forta malbono ol iam antaŭe.

Fidu en Dion, kiu estas sufiĉe ĉiopova por vin helpi kaj al vi prepari venkon super viaj malamikoj! Eĉ se vi falas, restariĝu denove kaj batalu plu! Neniam aranĝu pacon kun via peko! En ĉiu tempo denove kaptu la manon de la ĉiopovo de via Savanto! Li povas kaj volas vin helpi. Lia brako ne estas mallonga. Li estas la plej forta. Li povas la forte armitan, Satanon, ligi kaj lin elĵeti, depreni de li lian rabaĵon kaj vin fari libera. Kiamaniere do vi povas lasi vian koron iĝi la domo de la diablo aŭ tio resti, ja vi la templo de Dio esti aŭ iĝi povas?

Preĝo

Dio, nome mia Dio kaj mia Patro, ja Via kreitaĵo mi estas; Vi faris min, Kristo, Via savito mi estas; Vi, mia Savanto, estas ankaŭ por mi farita por la saĝo kaj justeco kaj por la sanktigado kaj saviteco. Vi sidas ankaŭ por mi dekstre de Dio; Vi ankaŭ por mi havas la tutan potencon, la tutan povon en Viaj manoj, por min savi el la pekoj, el la morto kaj de la diablo, eĉ se mi estas sklavo kaj kaptito. Vi ricevis donacojn ankaŭ por la falintoj (Psalmo 68,19), tiel ankaŭ por mi, se mi devojiĝis de Vi. Vi alprenas ĉiujn pekulojn, neniun forpuŝas, kiu sin al Vi turnas.

Vidu, ĉi tie ni estas kaj krias al Vi por graco kaj mizerikordo! Vi volas, Vi povas savi ĉiujn. Neniu kuŝas por Vi tro profunde en abismo, Vi povas kaj volas lin elpreni.

Eltiru min el la sklaveco de la peko kaj de la diablo; ne plu longe la peko kaj Satano en mi loĝu. Al vi apartenas mia koro, kaj Vi deaĉetis ĝin per Via sango. Ĝi estas Via, Vi ne povas ĝin plu lasi al iu alia.

Tiel sendu Vian limon, por ke la mallumo retiriĝu; donu Vian Spiriton, por ke Satano fuĝu! Donacu al mi Vian gracon, por ke la peko perdu sian pikilon; surtretu Satanon sub mia piedo, detruu lian povon kaj lasu min liberiĝi de li! Amen.

Restu ĉe Jesuo, animo mia, prenu vian savon konstante en observon, ĉar en tiu ĉi korpa kiraso vi ĉiam troviĝas en danĝero.

Tenu vian kronon firme, tenu fide, kion vi posedas; en persisto resti estas bone, la refalo donas pezan ŝarĝon.

Vera fidelo la vojon de Kristo plej multe ŝatas, ĉiam observas danĝerojn kaj ne laciĝas survoje, la karnon ne servas.

8. La morto de la sendia homo kaj la salajro de la peko

Tiel la malpentema pekulo kuŝas ĉi tie sur sia mortolito – plena de doloroj en sia korpo, en sia spirito plena de angoro kaj timoj, plena de timo kaj konsterniĝo antaŭ la morto, plena de hororo pro la venonta juĝo. Li estas plene forlasita, sen iu ajn helpo, kapabla nenian konsolon, ĉar li en Dion ne kredas kaj la Savanton ne rekonas; la morto staras antaŭ liaj okuloj kaj minacas al li, nun ĉion de li forpreni, ĉian ĝojon, ĉiujn bonaĵojn, ĉian honoron, volupton, ĉion, vere ĉion. Satano konfrontas lin kun liaj pekoj. Antaŭe li lin tentis ilin fari kaj prezentis al li la pekon ĉarme kaj bele; nun li lin per ĝi hororigas, timigas lian konsciencon kaj montras al li la salajron por la peko, kiu lin atendas, nome, la eternan pereon kaj la senfinan turmenton en la infero (Romanoj 6,23).

Li senespere rigardas ĉirkaŭ sin kaj nenie vidas ion alian ol timigajn figurojn; interne turmentas lin lia konscienco, kiu ĝis tiam dormis, sed nun per la milopa forto ĝi vekigis kaj metas lin en inferan angoron. Li vidas la inferon, la abismon malfermita, preta lin konsumi, por eternoj engluti. Li nenion bonan plu povas aŭdi, ĉar lia koro pro la pekoj jam delonge kontraŭ ĉiuj impresoj de la bono malmoliĝis kaj fariĝis surda kontraŭ la voĉo de Dio. Li deturnas sin for de la bona Spirito, de la graco, de la anĝelo²; pro tio ankaŭ tiu sin deturnas for de li kaj lasas lin al la malesperiĝo, en kies sinon li propravole kaj obstine sin ĵetis. Tiel li faras sian lastan spiron kaj aperas antaŭ la juĝa trono de Kristo kaj aŭdas el ties buŝo, kiun li en sia vivo malrespektis, kies vorton li ne aŭskultis aŭ ĝin denove forlasis, kies gracon li priridis, kies sangon li per siaj piedoj surtretis, li

² Anĝelo ĉi tie kaj en aliaj teksteroj estas nur simbolo de la Dia graco kaj ne vera spirita estaĵo, al kiu la homo sin devus turni. Rimarko de VO.

aŭdas el la buŝo de la Juĝisto sian nerevokeblan kondamnon: Iru for, vi damnita, en la eternan fajron!

Tiamaniere pagas la peko kaj la volupto de la mondo. Forĵetita, kondamnita de Dio, ekskluzivita el la ĉielo kaj por eterno elpelita for de la vizaĝo de Dio, li nun falas en abismon en la poreterne mizeregana situacion, en la fajron, kiu neniam estingiĝas, konsumata de la vermo, kiu neniam mortas.

Ho, kiom multaj homoj rapidas en la direkton de tiu poreterna perejo! Kiomaj, kiuj nomiĝas kristanoj kaj sin tiel prezentas, servas al la peko, la volupto, la hontiga deziro, disponigas sin al avido aŭ malŝparado, al orgojlo aŭ envio kaj ĝojo pro la damaĝo ĉe iu alia, al malĉastado aŭ al venĝemo, kolero aŭ senmezuremo kaj ebriemo, ĝenerale al la mondeca vivo! Ili probable konfesas siajn pekojn, tamen ne por sin plibonigi, sed nur el tradicio. Ili daŭrigas sian pekadon – kaj tiel ili kontinuas ĝis la fino, sen iam ajn ŝanĝi sian pensmanieron, sen iam ajn el plena koro siajn pekojn bedaŭri, sen iam ajn sin serioze kaj el sia plena animo turni al Kristo, la Savanto, sen iam serĉi por si gracon kaj mizerikordon. Ili restas ĉe siaj konfesadoj, ili partoprenas la sanktan vespermanĝon, ili frekventas preĝejon, aŭskultas predikojn kaj aliajn meditadojn, tamen daŭre la malnovaj homoj, servutuloj de la peko, infanoj de la mondo, sklavoj de la diablo, kaj ju pli da ekleziaj aranĝoj ili partoprenas, tiom pli rigidaj ili iĝas, kvazaŭ ili ne havus nepran bezonon ŝanĝi sian koron kaj verece konvertiĝi. Subite venas la morto kaj ilin forprenas, kaj ĉar ili semis en la karnon, tiel ili ankaŭ de la karno, la korupta, rikoltas; ja kion la homo semas, tion li rikoltos (Galatoj 6,7-8).

Aparte terura estas la morto de tiuj, kiuj jam iam la gracon ricevis, sed ĝin ne gardretenis; kiuj Kriston jam iam rekonis, sed ĉe Li ne restis, sed denove defalis kaj sin ĵetis en la brakojn de la mondo kaj de la peko; ĉar kiel la apostolo diras (Hebreoj 10,26-27; 6,4-6): „*Ĉar se, ricevinte la scion de la vero, ni pekos memvole, jam ne restas ofero pro pekoj, sed ia timoplena atendo de juĝo, kaj de fajra kolero, kiu ekstermos la kontraŭulojn.*” Kaj: „*Ĉar ĉe tiuj, kiuj unufoje estas allumitaj kaj gustumis la ĉielan donon kaj fariĝis partoprenantoj en la Sankta Spirito, kaj gustumis la bonan vorton de Dio kaj la potencojn de la estonta mondo, kaj defalis, ne estas eble renovigi ilin ankoraŭ al pento, dum ili rekrucumas al si la Filon de Dio kaj elmetas lin al publika malhonoro.*”

Ho, vi pekuloj, kiuj vin disponigis al viaj diboĉoj, ja vi scias, kion vi amas! Vi amas la morton kaj la kadukon. Tio, kio vin nun flatas, tio vin iam torturos. Pripensu tamen vian malican vojon kaj malamu la malbonon! Distancigu vin tamen de la diboĉo kaj de la peko; ĝi estas via perejo. Aŭskultu tamen la amikan voĉon de via bona paŝtisto Jesuo Kristo, kiu al vi vokas: Venu al mi! Mia sango faras vin pura de via peko. Mi pardonas al vi, mi faras vin sanktaj. Mi donas al miaj ŝafoj la eternan vivon!

Ne malmoligu viajn korojn kontraŭ la voĉo de via bona paŝtisto, por ke vi ne devos iam aŭdi la bruan voĉon de la Juĝanto: „*Terure estas fali en la manojn de la vivanta Dio*” (Hebreoj 10,31).

Preĝo

Dio, Vi estas justa kaj ĉiuj viaj juĝoj estas justaj. Ĉe Vi ne estas konsidero laŭ la persono, Vi al ĉiu repagos laŭ ties faroj. Kiu ne pentos, ne kredas en Vian vorton kaj ĝin ne retenos, tiu jam estas juĝata, tiu la vivon ne vidos, tiu restas en la morto por eternoj. Same, kiel Vi estas amika por la piaj kaj kredantaj, Vi estas horora por la malpentema pekulo, kiu ne konvertiĝas al Vi. Ho, Sinjoro kaj Savanto, Vi savis min de la peko, morto kaj infero; fortigu min, por ke mi ĝustatempe mian koron plene deturnu for de la koro kaj ĝin disponigu al Vi! Veku min, por ke mi estu eltirita el la morto por povi havi la vivon! Rompu mian koron, por ke mi faru seriozan penton, ke mi postsekvu la stimulado de Via Spirito kaj ke mi lasu min per Li transformi en alian, novan homon kaj poste vivu al Vi kaj al Vi mortu. Amen.

Ho, la plej amata Sinjoro, mi, kompatinda infano, nenie trovanta konsolon kaj pacon, ĵetas min, tiel mizera, kia mi estas, antaŭ Viajn okulojn petegante!

Ja mia tuta plendinda situacio estas al Vi pli bone konata ol al mi mem. Mi povas min turni, kiel mi volas, tamen mia koro sen Vi ne trovas pacon.

Ho, alrigardu min per via mizerikordo,
ĉar mi mem ne povas min helpi!
Ho, la Filo de la homo, kompatu min,
renovigu mian koron kaj faru ĝin pura!

9. La interna situacio de kristano, kiu ĝis la fino persistas en sia batalo kontraŭ la peko kaj en la praktikado de la sanktigata vivo

Vi vidas sur tiu ĉi bildo, kiel la koro de kristano de ĉiuj flankoj estas sieĝata de malamikoj. Satano kaj la peko sieĝas konstante kontraŭ ni kaj serĉas eblecon, atingi la malnovan regadon en nia koro. Sube staras du viroj, kiuj reprezentas la mondon, el kiuj unu provas per propono de pokalo logi al sensualaj diboĉoj kaj mondeca amuziĝo; la alia, kun ponardo, provas per minacoj, persekutoj, blasfemadoj kaj aliaj perfortaj rimedoj timigi antaŭ la bono kaj konduki la kristanon al la peka vivo.

Kontraŭ tiuj malamikoj de la savo, kontraŭ la karno, la mondo kaj Satano, kristano ĉi tie en tiu ĉi vivo ĉiam devas batali; sed lia koro estas armita kontraŭ tio, la malamikoj ĝin ne povas supervenki.

Supre ŝvebas *anĝelo*, la graco de Dio, kiu lin konstante kuraĝigas por lukti kaj por persisti, vokante al li: „*Kaj se iu konkuras kiel atleto, li ne estas kronata, se li ne laŭregule konkuris*” (2 Timoteo 2,5) kaj: „*Sed kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita*” (Mateo 24,13).

En la koro brilas la stelo hele kaj bele, kaj tio signifas, ke la fido en li estas viva, kaj la fido estas la venko, kiu la mondon supervenkas (1 Johano 5,4). Li estas plena de certeco, de konfido al Dio, tial en lia koro estas skribite sur unu flanko: „Dio, kiu al vi egalas?” Dio estas kun mi, kaj en Li kaj kun Li mi povas efektiviĝi ĉion. Lia graco estas por mi sufiĉe. Sur la alia flanko estas skribite: „*Kiu apartigos ni de la amo de Kristo? Ĉu aflikto, aŭ turmento, aŭ persekutado, aŭ malsato, aŭ nudeco, aŭ danĝero, aŭ glavo? – Sed en ĉio tio ni supervenkas per tiu, kiu nin amis*” (Romanoj 8,35.37).

En la mezo de la koro estas videbla *hostio* kun la subskribo: „Jesuo, mia amo!” Tio indikas pri lia forta malsato laŭ la vera spirita nutraĵo, laŭ la pano de la vivo, kiu el la ĉielo venis kaj al la mondo la vivon donis (Johano 6,33). Per tiu vivanta kaj viviga pano li nutras kaj plifortigas sian fidon kaj sian amon dum la ofta konsumo de la sankta vespermanĝo. Li trovas en tiu ĉi nutraĵo la plej grandan forton, la eternan vivon, kian ankaŭ Jesuo promesis: „*Kiu manĝas mian karnon kaj trinkas mian sangon, tiu havas eternan vivon; kaj mi levos tiun en la lasta tago*” (Johano 6,54-56).

Aldone vi vidas en la koro Kriston, la krucumitan, kaj la malfermitan libron, la evangelion, la Sanktan Skribon; ja legado kaj pritraktado de la vorto de Dio kaj precipe de la sufero kaj morto de Jesuo restas ĉiam lia la plej ŝatata okupiĝo kaj la plej dolĉa paŝtado, sur kiu li paŝtas sian animon, por sin kontraŭ la mondo kaj peko, kontraŭ la karno kaj Satano en ĉiuj provokoj armas kaj fortigas. Kiu ne havas kaj ne tenas Jesuon, la krucumitan, en sia koro, tiu certe estas vivante morta. Kaj kiu la vorton de Dio, la Sanktan Skribon, la evangelion, ne amas super ĉiuj aliaj libroj, ilin ne legas antaŭ ili ĉiuj kaj ilin pritraktas, ilin ne preferas antaŭ la tuta scienco, ilin ne prenas por regulo kaj vivlinio de sia vivo, tiu estas almenaŭ danĝere malsana en sia animo, se ne jam morta kaj tiel forĵetita.

Fine ni vidas en la koro *etan preĝejon, malligitan monujon, panon kaj fiŝon*. La preĝejeto signifas, ke li eme preĝas kaj persistas en preĝado, tiel dum kunvenadoj de la kredantoj, kiel ankaŭ hejme en la mallaŭta ŝlosita ĉambreto, kaj cetere ĉie, kie li iras kaj staras, lia koro komunikas kun Dio kaj vivas kaj ŝvebas en proksimo de Li, ĝojas en Lia proksimo, sin al Li disponigas, restas en Li. Sen preĝo neniu povas persisti en Dia beno, en fido, en amo ktp.

La malligita monujo indikas lian bonfaradon, lian gefratan amon al proksimulo. Li laboras kontraŭ la avareco, kiam li eme al siaj gefratoj en bezono disdonas, kiom li povas, por ekzerci la amon kaj sian koron ĉiam pli eltiri el la monda sfero. Li scias, ke tiuj animoj, kiuj eskapis Satanon tiamaniere, ke ili sin deturnis de aliaj krudaj pekoj, kiel diboĉo, senmeasuremo, tamen ofte nerimarkite refalas en la reton de Satano, ĉar ili sekrete sin dediĉas al la avareco, al la amo al mono kaj per diversaj ekskuzoj kaj pretekstoj forgesas fari bonon al aliaj.

La *pano* kaj la *fiŝo* indikas pri lia measuremo, sinlimigo kaj sobreco, ke li en ĉio serĉas la ĝustan mezuron, por ke li per neregula konsumo de nutraĵoj, trinkaĵoj ne nutru la volupton de sia karno, ke li tiel ne subpremu la spiriton kaj sin malkvalifiku por la ekzercado de pieco.

Per tiuj ĉi armiloj la firma kristano luktas; tiun ĉi armilaron li neniam demetas for de si, kaj tiel li retenas la kampon kaj venkas super ĉiuj siaj malamikoj, kontraŭ la mondo, la diablo kaj la karno.

Preĝo

Ho, Jesuo, mia amo, ke mi nur Vin havu, ĉu mi plu demandos pri la ĉielo kaj pri la tero? Restu Vi en mi kaj permesu min en Vi resti, tiel mi por ĉiam restos fruktodona vito. Sen Vi tamen mi povas fari nenion. Vivigu mian kredon ĉiam pli, por ke mi Vin, la Ĉiopovan, komprenu kaj per Vi, por kiu ĉiuj aferoj estas eblaj, supervenku ĉion. Via amo multiĝu en mi kaj bruligu mian tutan koron, por ke mi Vin, la plej altan Belon, la eternan Mirindon, super ĉio kaj nure amu kaj ekster Vi trovu nenion bela, nenion mirinda, nenion alloga kaj tikla, nenion de mia amo valora!

Donacu al mi la gracon de Via impeto, venu ĝi ekskluzive de Vi! Permesu per nenio min disigi de Via amo. Via kruco, Via morto kaj la memoraĵo de Via morto estu la nutraĵo de mia amo kaj de mia dependeco de Vi; ĝi ligu min nedisigeble al Vi. Donacu al mi per tio, kion Vi promesis, la eternan vivon, jam ĉi tie, kaj loĝu pere de mia fido en mia koro (Efesanoj 3,17). Via vorto, plena de Spirito kaj vivo, veku, prilumu, konsolu, kuraĝigu, vivigu kaj firmigu min ĉiutage en la lukto kaj en la tuta pacienco kaj fidelo.

Faru, ke mia tuta koro, ĉiuj miaj inklinoj, pensoj kaj aspiroj, estu dediĉataj al Vi! Faru, ke mi ne kontraŭbatalu nur kelkajn unuopajn voluptojn kaj deziregojn, sed ilin ĉiujn, tiel la avarecon same, kiel la diboĉon, la envion same, kiel la ĝojon super la malgajno de aliaj, kiel la orgojlon, koleron kaj venĝemon, kiel ankaŭ letargion kaj senmezuremon! Faru, ke mi preĝu senĉese, por ĉiam akiri de Vi novan forton por venki kaj por resti al Vi fidela ĝis la fino! Amen.

10. La morto de la diotima kaj justa homo

Homo, kiu en fido kaj en ekzercado de diotimo firme persistas ĝis la fino, fine ekkuŝas en sian mortoliton, kiam lia lasta horo venas, ĝoja kaj konsolita. Li timas nek la morton nek la juĝon, ja ili ambaŭ lin ne trafas, kiel Jesuo al ni certigis, dirante: „*Kiu aŭskultas mian vorton, kaj kredas al Tiu, kiu min sendis, tiu havas eternan vivon kaj ne venas en juĝon, sed jam pasis de morto en vivon*” (Johano 5,24).

Tiel nun la justa ĉi tie kuŝas, trankvila en sia konscienco, ĉar liaj pekaj estis pardonitaj kaj li ĝuas en sia koro la gracon de Dio. La krucon de Kristo li premas sur sian bruston, por montri sian amon kaj adoron al Jesuo Kristo, la krucumita, kion li dum sia tuta vivo portis en sia koro, en kiun li ĉiam plene kaj sole fidis, kiu ankaŭ nun, dum lia mortado, lia plena garantio estas. Al Li li vivis, al Li li mortas. El lia afabla, gaja vizaĝo estas la interna kvieto, la Dia konsolo, la sankta oleumiteco de la spirito, troviĝanta en lia koro.

La okulo kaj la koro estas direktitaj al la ĉielo kaj lia tuta aspekto esprimas kaj diras, kion lia interno pensas: „Mi havas ĝojon adiaŭi kaj esti ĉe Kristo.” La anĝelo de Dio atendas je lia animo, ĝis la tempo plenumiĝas, por ĝin porti en la sinon de Dio. Kiam li fine estas disigita de la ligoj de la korpo kaj morteco, lia animo rapidas direkte al tiu, je kiu ĝi ĉi tie kredis, esperis, kiun ĝi amis, sen Lin vidi. Kaj nun ĝi aperos antaŭ Lia vizaĝo. Kristo rapidiras al li kaj disvastigas ambaŭ brakojn dirante: Ho, vi pia kaj fidela servisto, vi estis fidela super malmulto; Mi volas vin starigi super multon; iru en la ĝojon de via Sinjoro (Mateo 25,21)!

Satano devas en honto fuĝi.

Kia ĝojo, kia agrablo estos, vidante Kriston alvizaĝe, kia Li estas, kaj nun iĝi al Li simila laŭ majesteco kaj sankteco! Kiu povus tion priskribi?

Tiel la justa homo mortas, en Kriston fidanta kaj en la batalo kontraŭ la peko, la mondon kaj la diablon firme obstinanta kristano. Tiel belan finon alprenas la lukto kaj la sufero de la piuloj! Ho, ke tio ĉiun kuraĝigu persisti en fido, persisti en batalo, ne laciĝi, kun plena seriozo lukti, tra la mallarĝa pordo eniri kaj la vetkuron feliĉe fini! Tie transe atendas mirinda krono, la nekadukebla, senmakula, mirinda heredaĵo.

Preĝo

Ho, Sinjoro Jesuo Kristo, kiel agrable estos iam en la mortolito ĉirkaŭ mia koro, se mi Vin havas en koro, se Vi estas ĉe mi kaj min konsolas! Kiu ankoraŭ povos min maltrankviligi, min malbeni? Kio pri miaj pekoj? Vi ilin al mi pardonis, min justigis, min lavis, purigis kaj sanktigis per via multekosta, kara sango. Ĉu Satano min povos provoki kaj terurigi? Ne. Vi lin supervenkis, forprenis de li povon; li povas al mi nenion misfari, ja Vi estas flanke de mi, ĉar Vi por mi mortis kaj releviĝis kaj sidas por mi dekstraflanke de Dio, Vi por mi petas kaj min reprezentas (Romanoj 8). Nenio do min dummorte de via amo povas disigi. Nun, mia plej amata Jesuo, igu min nur al Vi vivi, al Vi morti! Igu min nun vere fidele de vi dependi kaj neniam de Vi eskapi! Donu al mi gracon, ke mi ĉiutage mortu al ĉio, kio ne Vi estas, ke mia koro de ĉio adiaŭu, kio ne iras kun mi en morton! – Veku en mi la brulantan sopiron je Via ĉiela, eterna regno, ke mia iro jam nun estu en la ĉielo, kie mi jam estas registrita kiel civitano kaj domano. Tiu ĉi beata espero, iam esti ĉe Vi, plenigu min per persista impeto, ĉi tie fari bonon, sen laciĝi, por ke mi tie iam senĉese povos rikolti. Lige kun tio permesu, la plej amata Savanto, la fidon je Vi, la fidon je Via sankta merito, je Via mizerikordo kaj amo neniam sinki, sed igu min persiste esperi kaj fidi je Via sufero kaj morto, je via karega, senfina merito, ĉar Vi por mi mortis kaj nun por mi vivas de eterno al eterno. Amen.

Al Vi, la fonto de la vivo, Sinjoro Jesuo, vokas mia koro, al kiu mia doloro ankoraŭ neniam senfrukte plendis. Vi, foriganto de miaj pekoj, mi konas en plago kaj morto cetere neniun alian konsolon ol nur ĉe Vi, mia Dio!

Dum mia forta malesperiĝo, Jesuo, Via sufero, kiun vi por mi trasuferis, estu mia plej forta refreŝigo; Via sango revivigu min, kiun vi verŝis; nur al Vi mi volas rigardi, ĝis la koro kaj la buŝo forpasos.

Tia mia destino por ĉiam restu: postsekvi Jesuon, Vin, tio pelu min konstante, ĉi tie al Vi plaĉi.
Atendas mi sopire, ĝis rajtos mi ĉe Vi troviĝi,
Vin poreterne povi ĉirkaŭbraki,
eterne super Via esto ĝoji.

Johannes Evangelista Goßner (* 14-an de Decembro 1773 en Hausen inter Günzburg kaj Krumbach; † 30-an de Marto 1858 en Berlino) estis germana (bavaria) aŭtoro, unue katolika paroĥestro, poste protestanta pastoro, aŭtoro de ekleziaj kanzonoj kaj fervorega misiisto.

Goßner prenis sin dum sia tuta vivo por predikanto de la kristana evangelio. Unue li estis rom-katolika sacerdoto, post sia konvertiĝo (1826) evangelia (luterana) pastoro. Tiu ĉi alegoria libreto pri la homa koro estas nur unu el liaj multaj libroj kaj broŝuroj. Li fondis plurajn diakoniajn (protestanta organizaĵo por helpi al povruloj) kaj misiajn organizaĵojn en propra lando kaj en eksterlando. Li flegis leterkontakton kun gravuloj de la 19-a jarcento.

Inter la jaroj 1820-1824 li engaĝis sin misie. Li esperis, ke oni povus atingi la ortodoksajn kristanojn por surbaze de la Biblio aliĝi al la universala eklezio de Jesuo Kristo. Lia influo etendiĝis ĝis Finnlando. Tio ne plaĉis al la regantoj de la katolikaj germane parolantaj landoj. Tiel en la jaro 1824 la duko Metternich de Aŭstrio intervenis ĉe la rusa caro, kaj pro diplomataj konsideroj la caro elpelis la misiiston Goßner el St. Petersburgo, kie li misie agadis. Tamen li ĝis la fino de sia vivo restis en kontaktoj kun la kristana komunumo en Ruslando.

Goßner estis entombigita flanke de sia edzino Idda Bauberger. Okaze de la sepulto parolis la ĝenerala superintendente Büchsel, dirante:

„Li prave preĝis sub la muroj de la malsanulejo, li prave preĝis por la koroj de la fratulinoj en la malsanulejo, li prave preĝis por la koroj de riĉuloj, ke ili siajn manojn malfermu vaste trans la limoj de nia patrujo, li prave preĝis por la misia stacio en Hindio, kaj ĉi tie, sur la tero li per siaj preĝoj persistis kaj portis tra tentoj la korojn de la misiistoj, li per sia preĝado akvumis sian verkon kaj ĝin akompanis ĝis la limoj de la mondo. Ne nur ĉi tie apud lia tombo staras liaj spiritaj infanoj, ja li riĉe dissendis siajn infanojn vaste trans nia patrolando. La maljuna Goßner estis preĝanto.”